

En somero 2012 Bavara Ŝtata Biblioteko prenis la 100an datrevenon de la morto de Johann Martin Schleyer (1831-1912) kaj la 125-jaran ekziston de la plan-lingvo Esperanto kiel okazon aranĝi ekspozicion kaj simpozion sub la titolo „Inter Utopio kaj Realo“ kaj dokumentis ambaŭ aranĝojn en ekspozicia katalogo.

La prezentata broŝuro elmontras paralelojn, komunaĵojn kaj diferencojn ĉe la starto de la du plan-lingvoj kaj en la motivoj de ties aŭtoroj: la katolika Prelato Schleyer kaj la juda okulisto Lazar Markoviĉ Zamenhof (1859-1917).


La aŭtoro, *Reinhard Haupenthal*, estis instru-komisiito por esperantologio kaj interlingvistiko ĉe la Universitato Saarbrücken. Ĉef-akcentoj de lia laboro estas studoj pri la historio de Volapük, pri la vivo, agado kaj verkaro de Schleyer. Krom tio li prezentis multnombrajn bibliografiojn kaj akiris renomon kiel tradukinto de germana beletro al Esperanto. Jam en 1998 oni dediĉis al li festlibron *Menade bal pŭki bal*, en 2006 la Universitata Biblioteko Eichstätt lin distingis per persona bibliografio.

*Reinhard Haupenthal* vivas alterne en Suda Badeno kaj en Provenco.



ISBN 978-3-943341-02-7

ISSN 1866-0622



**VOLAPÜK.**

Die  
**Wellsprache.**

Entwurf  
einer Universalssprache für alle Gebildete  
der ganzen Erde.

*Ut cum uni sensui  
humano linguam*

Von

Johann Martin Schleyer.

Sigmaringen.  
In Kommission der Buchhandlung von G. Zappert.  
1880.

REINHARD HAUPENTHAL

## PRI LA START-KONDIĈOJ DE DU PLAN-LINGVOJ

LA UNUAJ LIBROJ DE SCHLEYER (1880) KAJ ZAMENHOF (1887)

Dr. ESPERANTO.  
**INTERNATIONALE  
SPRACHE.**  
**VORREDE**  
UND  
VOLLSTÄNDIGES LEHRBUCH.


*—por Germanoj—*

*Damit eine Sprache der Weltgeist  
werde, genügt es nicht sie zu lehren.*

Preis 40 Pf.

WARSCHAU.

Zu haben in der Buchhandlung von Gebethner et Woll  
1887.





REINHARD HAUPENTHAL

PRI LA  
START-KONDIĈOJ  
DE DU PLAN-LINGVOJ

LA UNUAJ LIBROJ DE SCHLEYER (1880)  
KAJ DE ZAMENHOF (1887)

EDITION ILTIS

2013



Tria, ŝanĝita kaj vastigita eldono.

EDITION ILTIS

DE-79415 Bad Bellingen

editioniltis@aol.com

© Alle Rechte vorbehalten

ISBN 978-3-943341-08-9

ISSN 1866-0622

## 0. Celo

En 2012 la interlingvistiko povis soleni du jubileojn: la 125-jaran ekziston de Esperanto kaj la 100an dat-revenon de la morto de Schleyer († 1912-08-16, Konstanz). Ambaŭ eventojn Bavara Ŝtata Biblioteko omaĝis per ekspozicio kaj simpozio sub la titolo „Inter Utopio kaj Realo. Konstruitaj lingvoj en globalizita mondo“.<sup>1</sup>

Bon-vena okazo denove prezenti la nunan studon<sup>2</sup>, kiu starigis al si trioblan celon:

1. elmontri la (malsamajn) start-kondiĉojn de la du plej gravaj plan-lingvoj de la 19a jar-cento: Volapük (1879/80) de la badena katolika pastro (poste prelato) Johann Martin Schleyer (1831-1912) kaj Esperanto (1887) de la hebrea okulisto Lazar Markoviĉ Zamenhof (1859-1917);
2. skizi la lingvo-kreajn motivojn de ambaŭ aŭtoroj;
3. atentigi, kiel Esperanto povis transpreni strukturojn kaj kadrojn de la jam establita Volapük-movado (lokaj grupoj, kongresoj, himno, majstro-kulto, Akademio ktp.).

<sup>1</sup> Kp. la ekspozician katalogon: *Zwischen...*

<sup>2</sup> Kp. ankaŭ la germanan version: HAUPENTHAL 2013 kaj la antaŭajn eldonojn: HAUPENTHAL 2000 a, b, 2007.



## 1. La starto de Volapük

### 1.1 „Ege originala alfabeto“ (1877)

La nevo de Schleyer, la instruisto Julius Schleyer (1853-1935), en 1879 publikigis sub la inicialoj s. i. e. du artikolojn en pedagogiaj revuoj<sup>3</sup>, dank' al kiuj ni disponas informojn pri la genezo de la plan-lingva pensado de Schleyer. En unu el siaj artikoloj li ankaŭ mencias novelon titolitan *La amo igas inventema*, kies tekston mi povis eltrovi lige kun la prepar-laboroj de mia Schleyer-prelego la 29an de junio 2002 en Litzelstetten<sup>4</sup> kaj eldoni en 2012.<sup>5</sup>

La protagonisto de la rakonto, Rudolfo, inventas „ege originalan alfabeton“<sup>6</sup> servantan al surduloj kaj blinduloj, se ĝi „estas lernata ankoraŭ antaŭ la komplete surdiĝo“<sup>7</sup>: per tuŝo de korpo-partoj per la komenc-literoj de ties nomoj formiĝas vortoj ekz.:

H aro  
E zofago  
R ipo  
M ano  
I ngveno  
N azo  
A kselo

}

La rezulto estas la nomo  
„Hermina“

<sup>3</sup> Vd. J. SCHLEYER 1879 a, b.

<sup>4</sup> Kp. HAUPENTHAL 2005.

<sup>5</sup> Vd. SCHLEYER 2012 a, b.

<sup>6</sup> Kp. J. SCHLEYER 1879 b, p. 249.

<sup>7</sup> Sam-loke.

La nepo de Schleyer raportas, ke lia onklo „iam elpensis ĉi alfabeton pro amo kaj kompato al grand-aĝa, debila, blindiĝinta virino kaj ĝin uzis por kompreniĝi kun ŝi.“<sup>8</sup>

### 1.2 La Mond-alfabeto

Kvankam la preta Volapük estas ia *deus ex machina*, io subita kaj neatendita eĉ por Schleyer mem, oni povas klare distingi tri fazojn en la mond-lingva krea agado de Schleyer.

Antaŭ ol krei plan-lingvon, Schleyer lanĉis la ideon pri mond-alfabeto. Ankaŭ pri tio atentigas lia nevo en la dirita artikolo: „[La aŭtoro] elpensis unuecan mond-alfabeton kaj en la pasinta jaro [1878, R. H.] en flug-folio aldonita al la de li redaktita *Sionsharfe* publikigis siajn ideojn kaj proponojn ĉi-rilatajn, kiujn ĉi-sekve ni aperigos laŭvorte kaj konservante la ortografion.“<sup>9</sup> Per tio kaj per pliaj publikigoj en du periferiaj revuoj<sup>10</sup> konserviĝis la mond-alfabeto de Schleyer. Efektive, alfabetaj reformoj lin akompanas tra la tuta vivo: ili manifestiĝas en amaso da broŝuroj kaj

<sup>8</sup> Sam-loke, p. 249.

<sup>9</sup> Sam-loke, p. 249.

<sup>10</sup> Kp. pri tio jenajn du artikolojn (anonimajn): Ein Weltalphabet. En: *Archiv für Post und Telegraphie*. Beiheft zum Amtsblatt der Deutschen Reichs-, Post- und Telegraphenverwaltung. Berlin 1878: 17 (Sept.), p. 534-537; Phonetische Recht- und Schnellschreibung und -Druck. En: *Die Tonkunst. Wochenschrift für den Fortschritt in der Musik*. Königsberg 6. 1878: 48 (30. Nov.), p. 338-339.



traktatoj kaj en ili estas verkitaj ankaŭ la tag-libroj. Ĉi proponoj de Schleyer restis sen adeptoj kaj imitoj.

### 1.3 La revuo *Sionsharfe*

En 1879, la naskiĝ-jaro de Volapük, Schleyer ne plu estis nekonato (kontraŭe al Zamenhof en 1887): li aŭtoris jam tutan aron da poeziaj verkoj<sup>11</sup> kaj, transpreninte en la fino de 1875 la parokon de Litzelstetten, ekde 1876 redaktis kaj eldonis la revuon *Sionsharfe*<sup>12</sup>. Dank' al ĉi-lastata, li havis plat-formon, sur kiu li povis moviĝi publike kaj laŭt-parolilon por heroldi la ĵus elpensitan lingvon. Efektive, la unuaj lernantoj de Schleyer rekrutiĝis el ĉi medio de la legantoj de *Sionsharfe*.<sup>13</sup>

Tamen, *Sionsharfe* neniam fariĝis movada organo, sed restis fidela al sia origina celo: servi al la katolika (eklezia) poezio.

Por doni propran voĉon kaj kuntenilon al sia juna movado, Schleyer lanĉis, jam en januaro 1881, propran organon: *Volapükabled*<sup>14</sup> kiun li sukcesis viv-teni ĝis 1908.

<sup>11</sup> Kp. SCHLEYER 1864, 1865-1872, 1868, 1869, 1871, 1872, 1873 a, b, c.

<sup>12</sup> *Sionsharfe*. Monatsblätter für katholische Poesi [sic!]. Sigmaringen: Tappen i. Komm. 1. 1876 - 6. 1881: 1-66 (p. 1-562); Überlingen: Feyel i. Komm. 7. 1882 - 9. 1884: 67-102 (p. 563-850). La jar-kolektoj 1876-1879 ne plu estas troveblaj.

<sup>13</sup> Kp. KNIELE 1888/89 kaj KNIELE 1989.

<sup>14</sup> *Weltspracheblatt. Volapükabled*. Monatsblätter der Weltsprache „Volapük“. Überlingen: Feyel 1. 1881 - 4. 1884: 1-48 (p. 1-202); Konstanz: Schleyer 5. 1885 - 16. 1896: 49-192 (p. 203-808); Graz:

Dank' al la propraj rakontoj de Schleyer (konfirmitaj per tag-libraj notoj) ni konas la precizan naskiĝ-momenton de Volapük: 1879-03-31. Nelonge poste, Schleyer publikigis unuan lingvo-skizon en suplemento de *Sionsharfe*. Kvankam la jaraloj 1876 ĝis 1879 malaperis, ĉi suplemento konserviĝis<sup>15</sup>. Ankaŭ la diritaj artikoloj de Julius Schleyer reproduktas ĉi „Pra-Volapükon“.

### 1.4 La „Unua Libro“

La vera starto de Volapük tamen okazis nur en 1880. En printempo tiu-jara Schleyer publikigis ĉe Tappen en Sigmaringen la unuan ampleksan lerno-libron de Volapük.<sup>16</sup> Ĝin ni poste komparos kun la Unua Libro (por germanoj) de Zamenhof. Kontraŭe al ĉi-lastata, kiu ne sekvigis novajn eldonojn de siaj unuaj libroj (kun la escepto de la rusa versio)<sup>17</sup>, Schleyer pretigis de ĉi lerno-libro eldonon post eldono (ĝis la 9a en 1888) kaj konsideris valida ĉiam nur la lastan.

Zetter 17. 1897 - 26. 1906: 193-312 (p. 809-1288); Konstanz: Schleyer 27. 1907 - 28. 1908: 313-336 (p. 1289-1384).

<sup>15</sup> Kp. SCHLEYER 1879.

<sup>16</sup> Vd. la faksimilon titol-paĝan sur p. 20. – Fotorepr. SCHLEYER 1982.

<sup>17</sup> Vd. ITÔ 1987.



## 2. La starto de Esperanto

Se ĉe Schleyer temis pri la evoluo de ideo konkretiĝinta en preta lingvo, la Zamenhofa Esperanto trairis evolu-fazojn por atingi sian definitivan formon en 1887.

La restojn de la fruaj provoj Zamenhofaj kolektis Gaston Waringhien (1901-1991) kaj analizis ilin. La situacio – pro malarkivemo de Zamenhof mem kaj pro posta neglektemo de la esperantistoj – iom similas al tiu de vetustaj lingvoj naciaj: ankaŭ ties spuroj kaj praformoj perdiĝas ie en la tenebro de la historio.

### 2.1 Lingwe Universala

Pleje malabundas la konservitaj pecoj de la gimnaziano el 1878. Nur ĉi kvar versoj konserviĝis:

*Malamikete de las nacjes  
kadó, kadó, jam temp' está.  
La tót homoze in familje  
Konunigare so debá.*

Interese, ke ĉi „jam temp' está” iĝis firma, ĉiam duon-ŝerca, dir-maniero en la nuna Esperanto.<sup>18</sup>

<sup>18</sup> Ĉu memori, ke Gonçalo Neves travestiis la „kadó, kadó” en mini-rakonto aperinta en *Ekstremoj* (Wien 1997).

## 2.2 Pra-Esperantoj

Ankaŭ ilin analizis Waringhien kaj pli frue Julius Penndorf (1873-1950)<sup>19</sup> kaj Gyula Baghy (1891-1967). Surbaze de la Waringhien-aj kolektoj detalan prezenton de ĉi lingvo-projektoj entreprenis Richard Cash<sup>20</sup>.

Ĉi-sekve ni ne prezentos analizon de la praaj kaj arkaaj lingvo-projektoj de Zamenhof el filologia vidpunkto. Gravas tio ĉi: kontraste al Schleyer kiu laboris kapsalte-senhalte, Zamenhof trairis de 1878 ĝis 1887 evolu-fazojn por atingi la definitivan formon de sia lingvo. La postaj reformoj de 1894 kaj tiuj lige kun la Ido-krizo (1907) estas nur pseŭdaj plibonigoj. Zamenhof sciis, ke li atingis la plej bonan solvon kaj poste cedis nur *pro forma* al la postuloj de reformistoj. Ĉi lastaj ĉiam tuŝis nur la surfacon, sed neniam la esencon de la lingvo. Zamenhof, male, konsciis, ke li trovis optimuman formon. Dank' al ĉi konscio, jardekon post la reforma febro de 1894 li povis formuli la antaŭparolon de la *Fundamento* kaj la Bulonjan Deklaracion en kies kvara paragrafo troviĝas jena grava frazo:

„Sed pro la plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la

<sup>19</sup> Pri Penndorf kp. PABST.

<sup>20</sup> Vd. BAGHY, CASH, PENNDORF, WARINGHIEN.

kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris per kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.”<sup>21</sup>

## 2.3 La kvin Unuaj Libroj

Ni scias, ke Zamenhof longe prokrastis la publikan elpaŝon, kredeble ne nur pro mono-manko, sed ankaŭ pro timo, ke oni konsideros freneza kuraciston kiu kreis arte-faritan lingvon. La doto kiun Sender Silbernĉi (1831-1906)<sup>22</sup> disponigis al sia filino Klara (1863-1924) ebligis al Zamenhof la presadon kaj dissendon de la unuaj kvin broŝuroj de la projekto de Lingvo Internacia kiujn li elirigis (en ĉi sinsekvo) en la lingvoj rusa, pola, franca, germana kaj angla.<sup>23</sup> Zamenhof mem (en sia letero al Borovko, vd. ĉap. 3.21) nomis ĉi paŝon en la publikon la transiro de Rubikono.

Surbaze de ĉi broŝuroj baldaŭ aliaj aŭtoroj komencis verki unuajn lerno-librojn sia-lingve. La ĉi-sekva tabelo donas koncizan superrigardon:

<sup>21</sup> Vd. ZAMENHOF 1963, p. 37.

<sup>22</sup> Pri Silbernĉi ekzistas anonime verkita nekrologo de Zamenhof mem, kies tekston mi povis identigi per retrovita letero de Zamenhof (1906-04-04) al Presa Esperantista Societo. Kp. HAUPENTHAL 1980. La literaturon pri Silbernĉi registras HAUPENTHAL 2012.

<sup>23</sup> Faksimiloj aperis en LD: I. *unuaj libroj*. (Kioto): Ludovikito 1991. 476 p. La germanan Unuan Libron mi mem jam pli frue reprenis: ZAMENHOF 1887.

Jaro	N-ro en la N-ro maro	aŭtoro	lingvo	nuna alireblo
1889	13	Hanec <sup>24</sup>	hebrea	LD XVI, p. 1-113
	23	Hanec	jidiŝa	LD II, p. 147-215
	24	Henriclundquist <sup>25</sup>	sveda	LD I, p. 349-393
	29	Libeks <sup>26</sup>	latva	LD II, p. 253-344
1890	33	Nielsen <sup>27</sup>	dana	LD III, p. 1-73
	34	Bogdanov <sup>28</sup>	bulgara	LD III, p. 74-172
	35	Marignoni <sup>29</sup>	itala	LD II, p. 173-253
	36	Rodríguez Huertas <sup>30</sup>	hispana	LD III, p. 255-312
	39	Lorenc <sup>31</sup>	ĉeĥa	LD III, p. 313-342
1891	47	Dombrowski <sup>32</sup>	litova	LD III, p. 343-418

## 3. La motivoj de ambaŭ aŭtoroj

Estus la tasko de ia psiko-lingvistika disciplino de la interlingvistiko esplori kaj prezenti la kreo-motivojn de plan-lingvaj aŭtoroj. Eble la plimulton el ili spronis nur la obsedo plibonigi kaj reformi la

<sup>24</sup> Pseŭdonimo de Zamenhof.

<sup>25</sup> Gustav Henriclundquist, pseŭd. Sébastien Voirol (1865-1930). Kp. EdE, p. 210.

<sup>26</sup> Rudolfs Libeks (1854-1908). Kp. EdE, p. 336; NEILANDE.

<sup>27</sup> Christian Nielsen (1827-1896). Kp. SØRENSEN/DREWSSEN.

<sup>28</sup> Miloslaw Bodganov (1868-1914). Kp. MURGIN.

<sup>29</sup> Daniele Marignoni (1846-1910). Kp. EdE, p. 359, ASTORI.

<sup>30</sup> José Rodríguez Huertas (vivo-datoj nekonataj). AZCUÉNA-GA VIERNA 1987, 2009.

<sup>31</sup> Francisko Vladimiro Lorenc (1871-1957). Kp. EdE, p. 353, MAŘÍK.

<sup>32</sup> Aleksandro Dambrauskas (1860-1937). Kp. ADOMĖNAS; EdE, p. 100-101.



lingvojn de Schleyer kaj Zamenhof kiuj ambaŭ kre-  
iĝis sendependaj unu de la alia kaj sekve prezentas  
originecon de ideo fremdan al ĉiuj postaj aŭtoroj.

Feliĉe ni disponas pri dokumentoj en kiuj ambaŭ  
aŭtoroj parolas pri sia inspiriĝo kaj la motivoj kiuj  
animis ilin iĝi lingvo-kreantoj. Ambaŭ estas retro-  
spektivaj.

### 3.1 La retrospektivo de Schleyer (1888)<sup>33</sup>

En 1888, kiam Volapük jam atingis sian apogon,  
Schleyer mult-vorte rakontas ĉi epizodon. Dum sia  
oficado en Krumbach (1867-1875) li konstatis, ke pro  
misortografiado kamparano de lia paroko ne suk-  
cesis kontakti sian filon en Usono. Pastro Schleyer  
sukcesis rekonstrui la aŭtentan ortografion de la  
adreso kaj restarigi la kontakton. Kaj subite „per  
fulma forto“ li havis la ideon pri unu monda orto-  
grafio kaj unu mond-lingvo.

„Ĉi-maniere, pro pura amo al miaj parokanoj kiel  
al ĉiuj homoj kun la devoj eliri en la vastan mondon  
aŭ korespondi tut-monde, en mi maturiĝis la ideo de  
universala lingvo laŭ la realigo en la nuna oka el-  
dono de mia gramatiko.“ (kol. 4.)<sup>34</sup>

<sup>33</sup> Kp. SCHLEYER 1888.

<sup>34</sup> Pri la oka eldono kp. SCHLEYER 1887.

Schleyer iom fanfarone elnombras sian lingvo-  
konon akiritan ĝis 1879 per 43-jara studado: nur  
 kvin-jara li eklernis latinon, poste en la gimnazio de  
 Tauberbischofsheim la francan, grekan kaj hebrean,  
 krome la anglan kaj italan. En la universitato de  
 Freiburg aldoniĝis la araba kaj siria, en Wertheim la  
 rusa kaj portugala. En postaj jaroj li daŭrigis la  
 lingvo-studojn kaj atingis 55 lingvojn. Nenion sciante  
 pri la laboroj de Leibniz, Wilkins, Bachmeier k. a.<sup>35</sup> li  
 kreis Volapükon.

„En maniero al mi mem enigma, eĉ mistera, en  
 malluma nokto en la pastra domo de Litzelstetten  
 apud Konstanz, en la angula ĉambro dua-etaĝa kun  
 rigardo al la pastra ĝardeno, dum viva medito pri  
 ĉiuj stultaĵoj, misaranĝoj, mizeroj kaj lamentindoj de  
 ĉi epoko, subite la konstruo de mia mond-lingvo kiel  
 tuto staris lume antaŭ mia spirita okulo. Por diri la  
 veron kaj por konfesi mian anim-staton de tiu  
 stranga nokto en marto 1879, mi povas kun plena  
 danko kaj humile diri nur ĉi tion: al mia bona genio  
 mi dankas la tutan sistemon de la mond-lingvo  
 Volapük. – La 31an de marto 1879 mi skribe kompilis  
 unua-foje la ĉef-traĵtojn de mia gramatiko.“ (kol. 19.)

<sup>35</sup> Pri Leibniz kp. BLANKE 1996, DIELS, MAAT, SONDER-  
MANN. Pri Wilkins kp. EMERY, FUNKE. – Anton Bach-  
maier (1820-1903) publikigis en 1868 pazigrafian vortaron  
(BACHMAIER).

La vojo al plan-lingvo por Schleyer do estis rezulto de racio kaj analizo. La krea akto estis intuicia kaj spontana.

Ni vidos, ke ĉe Zamenhof la vojo iras tra la emocioj kaj ke li sentis sin mesio de la juda gento kaj geto.

### 3.2 La motivoj de Zamenhof

Du fojojn Zamenhof retrospektive parolas pri la geneza fazo de sia lingvo: en 1896 en letero al la rusa esperantisto Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko (1863-1913) kaj en 1905, mallonge antaŭ la Bulonja kongreso, en letero al la franca advokato Alfred Michaux (1859-1937).

Dum longa tempo la letero al Borovko apartenis al la plej konataj tekstoj de Zamenhof: mult-loke ĝi estis represita kaj aperis ankaŭ en lerno-libroj tiel, ke eĉ debutantaj esperantistoj konatiĝis kun la lingvo-kreaj motivoj de Zamenhof.

#### 3.21 La letero al Borovko (1896)<sup>36</sup>

Ŝajnas, ke Borovko estis unu el la tre malmultaj esperantistoj kiuj demandis sian Majstron pri la embria periodo de la lingvo kaj pri la motivoj lingvo-kreaj. Ni resumu la respondon de Zamenhof:

<sup>36</sup> Unue en: *Lingvo Internacia* 1. 1896: 6/7, p. 115-119. Faksimila represo en: *LD XI* (1993), p. 135-139. – La teksto aperis ankaŭ en *OV*, p. 417-422 kaj en *PVZ* 4, p. 27-35.

1. La ideo pri komuna lingvo aperis jam „en la plej frua infaneco” de Zamenhof. El tio rezultas la obstino per kiu li vartis ĉi ideon.
2. La rasismo kaj lingva diskriminacio regaj en la tiama Bjelostoko „donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj agadoj”.
3. Revivigi la klasikajn lingvojn (grekan kaj latinan) montriĝis utopio.
4. Anstataŭ tio, revo pri nova, arta lingvo.
5. La ekkono de la angla instruis pri gramatika minimumo.
6. La afiksa sistemo de la pola kaj la rusa portis la ideon minimumigi la vort-faradon.
7. Aprioraj vortoj tro malfacilas mnemoteknike. El tio rezultis la ideo pri naturalisma leksiko (romana-germana) surbaze de la principo de internacieco.
8. Provizora fino je 1878-12-05(15): festo de „lingwe uniwersala”.
9. Sekvas (silenta) periodo ses-jara kun perfektigoj kaj elprovoj. Zamenhof devis „ĉirkaŭhaki, anstataŭigi, korekti kaj radike transformi”. Elformiĝis la spirito de la lingvo.
10. Necesis aranĝi la lingvon en formo de „ŝlosilo” por akceli ties tujan praktikecon. Tio lin venigis al la strukturo de siaj Unuaj Libroj.
11. En julio 1887 (post antaŭa vana eldon-provo) Zamenhof „transiris Rubikonon”.



Kvankam Zamenhof en la komenco de sia letero diras, ke „multon mi mem jam forgesis“, ni konstatas, ke rilate la motivojn li ne eraras. Nun-tempe ni scias, ĉefe dank' al la studoj de Naftali Cvi Maimon (1905-1984) kaj dank' al diversaj esploroj pri la cionisma kaj hilelisma-homaranisma agado de Zamenhof<sup>37</sup>, ke efektive la radikoj de Esperanto kuŝas funde en la juda medio, en la fakto, ke li estis „hebreo el la geto“.

Maimon<sup>38</sup> eltrovis, ke la privata instruisto Elie'zer Dov Liberman (1820-1895) en sia libro *Megilat Sefer*<sup>39</sup> publikigis leteron adresitan al Jozef Zeev Samenhof, frato de Marko Fabianoviĉ Zamenhof (1837-1907), do onklo de Lazaro, en kiu li parolas pri la Babel-tura generacio. Maimon elmontras, ke al ĉi etiologia legendo pri la babela turo Zamenhof poste plur-foje aludis.

Jen do unu (kaj eble la decida) ŝlosilo al la motivoj de Zamenhof.

<sup>37</sup> Kp. CHERPILLOD, GISHRON, KISELMAN, KÜNZLI, MAIMON 1978, ZAMENHOF 1973 b (kun detala bibliografio).

<sup>38</sup> Kp. MAIMON 1966.

<sup>39</sup> [Libro-rulaĵo.] Yohannisburg 5614 [t. e. 1853/54.] 135 p.

### 3.22 La letero al Michaux (1905-02-21)<sup>40</sup>

En ĉi grava aŭtobiografia letero Zamenhof unue akcentas sian hebreecon kaj ties signifon por ĉiuj liaj agadoj. Poste li reliefigas la ideon de hilelismo kiun li konsideris rimedo por unuigi la homaron. Pro timo kompromiti Esperanton, Zamenhof longe ne kuraĝis elpaŝi publike kun la hilelisma (poste homaranisma) projekto. Oni scias, ke nur en 1912, okaze de la kvaron-jarcenta jubileo en la Krakova kongreso li retiriĝis de sia publika rolo en la Movado. Kiel privatulo li esperis sin dediĉi al la ellaborado de la homaranismo. Sed la eksplodo de la milito nuligis ĉi esperon kaj la tuto restis nefinita, eĉ falis en forgeson kaj ĝis hodiaŭ estas apenaŭ konata de la plimulto de la esperantistoj.

Ankoraŭ sam-jare (1905-09-24) Zamenhof ripetis, en letero al sia sam-gentano Emile Javal (1839-1907), la gravecon de la hilelisma ideo kiu prezentis por li la ĉefan spronon elpaŝi ankaŭ per arte-farita lingvo.<sup>41</sup> „La tuta afero Esperanta estas nur *parto* de tiu komuna ideo, kiun mi nomas Hilelismo.“<sup>42</sup>

<sup>40</sup> Ĉi leteron, kies originalon gardas la biblioteko de Saint Omer, unua-foje publikigis Waringhien en *EdE* (sub „Zamenhof“). Poste ĝi reaperis en *LZ I*, p. 105-112 kaj en *PVZ 7*, p. 176-187.

<sup>41</sup> Ĉar sia-tempe Zamenhof petis, ke Javal konservu la leteron pro ties graveco, en 1973 mi eldonis ĝin faksimile kiel apartan broŝuron. Kp. ZAMENHOF 1973 b.

<sup>42</sup> Sam-loke, p. 11.

## 4. La analizo de la du verkoj

### 4.1 Komparo de la titol-paĝoj

Post la prezentitaj prolegomenoj ni povas nun transiri al la du verkoj mem. La faksimiloj de la du titol-paĝoj faciligos nian taskon. Mir-frapas la komparo de la titol-paĝoj: La granda simileco prave supozigas, ke Zamenhof intence imitis la pli fruan verkon de Schleyer. Jen la samaĵoj:

1. Ambaŭ titol-paĝoj enhavas 13 liniojn kaj kvar disigajn liniojn kun parte eĉ simila ornama karaktero.<sup>43</sup>
2. La titolo donas la nomon de la lingvo (Volapük, resp. Internationale Sprache) kun la diferenco, ke Schleyer ĉerpas la nomon el sia lingvo mem, dum Zamenhof aplikas la naci-lingvajn ekvivalentojn de „Lingvo Internacia“.
3. Ambaŭ havas subtitolon precizigan: Skizo de universala lingvo por ĉiuj kleruloj de la tuta tero (Schleyer); Antaŭparolo kaj plena lernolibro (Zamenhof).
4. Ambaŭ sekvigas moton: Schleyer la latinaĵon *Unam uni generi humano linguam!* (Al unu homaro

<sup>43</sup> Restas neklare kiel nomi per tipografia termino tiajn liniojn: angle: *swelled rule*, germane: *englische Linie*. Ĉi-lastata angla linio retroviĝas en diversaj lingvoj laŭ dankinda informo de István Ertl kaj Nils Utne. Kp. COLLIN k. a.

unu lingvon, kio iĝos la volapüka devizo *Menade bal püki bal*), Zamenhof: Por ke lingvo fariĝu *mond-lingvo*, ne sufiĉas *nomi* ĝin tiel. Jen tute klara ironia aludo al la nomo de Volapük (*vol* = mondo, *pük* = lingvo).

5. Sekvas la aper-loko: Sigmaringen (Schleyer), Varsovio (Zamenhof).
6. Ambaŭ verkoj aperis ĉe komisia eldonisto: Carl Tappen (Schleyer), Chaim Kelter (Zamenhof). La nomo de ĉi-lastata aperas sur la malantaŭo titol-paĝa. La sama presisto pretigis ankaŭ la alilingvajn eldonojn de la Unua Libro.

Kion ni scias pri tiuj eldonistoj?


Detaloj pri la varsovia presisto Kelter ŝajnas nekonataj. *EdE* (p. 285) nomas lian filon Jakob (1869-1922). Laŭ ĝi la presejo ankoraŭ ekzistis en la 1930aj jaroj.

Pri Carl Tappen (1824-1883) mi povis eltrovi: „Carl Johann, kortega libristo en Sigmaringen, naskita en Kolonjo la 13an de julio 1824, mortinta en Sigmaringen la 24an de decembro 1883.

La 24an de julio 1856 li edziĝis al Antoinette Eckhardt (naskita en Karlsruhe la 25an de julio 1825), filino de la Sekreta Financa Konsilisto Matthias Eckhardt en Karlsruhe kaj de Maria Theresia nask. Eckardt. Por lerni la libro-komercon la 23an de aprilo 1839 li iĝis lernanto ĉe la libro-vendejo Gerstenberg en Hildesheim, kie li restis ĝis la 3a de julio 1845. Dungita poste ĝis la jaro 1848 kiel helpisto en la libro-vendejo Pustet en Passau



# VOLAPÜK.



Die  
**Weltsprache.**

Entwurf

einer Universalsprache für alle Gebildete  
der ganzen Erde.



*Unam uni generi  
humano linguam!*

Von

Johann Martin Schleyer.



Sigmaringen.  
In Kommission der Hofbuchhandlung von G. Tappen,  
1880.

Dr. ESPERANTO.



# INTERNATIONALE SPRACHE.

## VORREDE

UND

## VOLLSTÄNDIGES LEHRBUCH.

—por German, o j—

Damit eine Sprache zur *Weltsprach.*  
werde, genügt es nicht sie so zu benennen.



Preis 40 Pf.

WARSAU.

Zu haben in der Buchhandlung von Gebethner et Wolff

1887.

kaj poste en la libro-vendejo Nödeke en Karlsruhe, poste en Lübeck provis akiri pozicion mem-starn, fine de la jaro 1852 ankoraŭ laboris en la libro-vendejo Cotta en Munkeno, la 20an de oktobro 1854 li transprenis sorti-ment-librejon en Sigmaringen. En 1859 li vastigis sian komercon per la akiro de libro-presejo kaj poste per la instalado de filio en Ebingen. En la jaro 1862 (?) li akiris domon en Sigmaringen vid-alvide de la princa palaco. La princo de Hohenzollern-Sigmaringen atribuis al li predikaton „kortega libristo“.<sup>44</sup>

La Ŝtata Arkivo de Sigmaringen informis min per letero de 1996-08-05: „Estas strange, ke pri la libro-komercisto kaj libro-presisto Carl Tappen ankoraŭ ne ekzistas biografio. [...] La Kolonjo-devena libristo Carl Tappen 1854-11-09 petis de la registaro de Sigmaringen la koncesion pri transdono de libriska komisiono en Sigmaringen, kiun sub dato de 1854-12-01 li fakte ricevis. Laŭ ĉi peticio de Tappen, ĉi-lastata, post plenumo de la libriska ekzameno 1854-10-18 aĉet-akiris la librejon Beck kaj Fränkel en Sigmaringen. Per letero de 1862-04-26 Carl Tappen petis de la registaro pri libro-presista koncesio por daŭrigi la libro-presejon de sia frato Louis Tappen en Sigmaringen. Sukcesinte la 21an de julio 1862 en ekzameno por gvidado de libro-presejo postulata ĉi-cele, li per administra akto de 1862-07-27 ricevis la koncesion.“

★ ★ ★

<sup>44</sup> Kp. TAPPEN, p. 200.

La diferencoj pokas, sed gravas. Schleyer elpaŝas per sia plena nomo, dum Zamenhof sin kaŝas sub la pseŭdonimo D-ro Esperanto. Certe Zamenhof mem ne antaŭvidis, ke lia pseŭdonimo jam baldaŭ transiros al la lingvo mem. Sed la ŝlosilo al la vera aŭtoro li donas sur la malantaŭa kovrilo, kie aperas lia vera nomo.

### 4.2 La enhava strukturo

La ĉi-sekva sinoptiko prezentu al ni la enhavan strukturon de ambaŭ verkoj:

Sinoptika komparo de la enhavo	
<u>Volapük</u>	<u>Esperanto</u>
<ul style="list-style-type: none"> <li>• Antaŭrimarkoj (p. III-IV)</li> <li>• Mond-alfabeto (p. V-XI)</li> <li>• Registro (p. XII)</li> <li>• I. Nia mond-alfabeto (p. 1-3)</li> <li>• II. Nia mond-gramatiko (p. 3-29)</li> </ul>	<ul style="list-style-type: none"> <li>• Cenzur-noto, rezigno pri aŭtoraj rajtoj (p. 2)</li> <li>• Antaŭparolo (p. 3-10)               <ol style="list-style-type: none"> <li>1. ĉef-tasko (facileco) (p. 10-12)</li> <li>2. ĉef-tasko (praktika utilo) (p. 13-21)</li> </ol> </li> <li>• Lingvaj specimenoj (p. 21-25)               <ol style="list-style-type: none"> <li>I. Patro nia</li> <li>II. El la Biblio</li> <li>III. Letero</li> <li>IV. Mia penso</li> </ol> </li> </ul>



## Sinoptika komparo de la enhavo

<u>Volapük</u>	<u>Esperanto</u>
Frazoj por ripetado (p. 29-32)	V. El Heine
Tradukaj ekzemploj (p. 32-36)	VI. Ho, mia kor'
Versoj en Volapük (p. 37-38)	
Mallonga kompara gramatiko (p. 39-48)	• Daŭrigo de la antaŭparolo:
Mondleksikono [t. e. vortaro]: (p. 49-88: D-Vp; p. 88-132: Vp-D)	3. Konsento (p. 26-33)
Sufiksoj kaj prefiksoj (p. 132-135)	• Blanketoj (Promesoj) p. 35-42
Pres-eraroj (p. 136-137)	• Plena lerno-libro (16 reguloj) p. 43-48)
• Postparolo	• Fald-folio (Vortaro Eo-D)
• Fald-folio (diplomo)	

Kion montras ĉi komparo?

1. La broŝuro de Zamenhof ampleskas 48 paĝojn kompare kun XII + 138 = 150 paĝoj ĉe Schleyer.
2. Plej okul-frapa diferenco estas la vortaro: ĉe Schleyer ĝi okupas la paĝojn 49-132 (t.e. la leonan

parton de la verko)<sup>45</sup>, ĉe Zamenhof ĝi praktike ne ekzistas, sed troviĝas aldone sur fald-folio. La fantomo de la grandegulaj vortaroj (pri kiu li parolis en la letero al Borovko) ne plu hantas...

3. La lingvaj ekzemploj de Schleyer efikas lerno-librece kiel rezultoj de paradigmoj parkerendaj. Zamenhof portas vivajn ekzemplojn kaj specimenojn literaturajn (inkluzive de du originalaj poemoj).
4. Schleyer tuj prezentas kreotan hierarkion kiu donos al li la pozicion de papo. Zamenhof, male, foriras de la scenejo kaj igas sian lingvon ĉies lingvo. Lia ideo pri promesoj (ellernado de la lingvo, kiam dek milionoj da personoj promesis same) montriĝis komplete utopia, sed konkrete kaj reale, jam en 1889 Zamenhof povis aperigi la unuan adresaron kun milo da adresoj.<sup>46</sup>

Ĝis nun neniu analizis la vort-stokojn de ambaŭ start-verkoj. Pro la malsama morfem-strukturo de ambaŭ lingvoj tio prezentas apartan problemon. La kadro de ĉi studo ne sufiĉas por doni detalan analizon. Sed specimene, jen paraleligo de la litero A (laŭ la fald-folio de Zamenhof).

<sup>45</sup> Ĝi malaperas en la 2a eld. (1882) kaj 3a eld. (1884), sed reaperas en la 4a (1884). Intertempe aperis ankaŭ apartaj eldonoj: <sup>2</sup>1882, <sup>3</sup>1885.

<sup>46</sup> Vd. faksimilon en LD IX, p. 1-39.

Nur lasta-tempe Gonalo Neves esploris pli de-  
tale la interdependecon de Volapük kaj Esperanto,  
ankaŭ rilate la leksikon de ambaŭ lingvoj.<sup>47</sup>

### Vortara komparo Esperanto-Volapük<sup>48</sup>

<u>Esperanto</u>	<u>germana</u>	<u>Volapük</u>
acid	sauer	– 1)
aĉet	kaufen	lemön
adiaŭ	adieu	– 2)
aer	Luft	lut
afer	Werk, Sache	din
agl	Adler	– 3)
agrabl	angenehm	lesumik
aĝ	Alter	bäled
akompan	begleiten	– 4)
akr	scharf	japik
akv	Wasser	vat
al	zu	al
ali	ander	votik
almenaŭ	wenigstens	– 5)
alt	hoch	geilik
alumet	Zündhölzchen	– 6)
am	lieben	löfön
amas	Menge, Haufen	möd
amik	Freund	flen

<sup>47</sup> Kp. NEVEp.

<sup>48</sup> La mankantajn vortojn mi trovis en SCHLEYER 1885. (La 2. eld. de 1882 mi ne posedas.) Jen iliaj ekvivalentoj: 1) züdik; 2) lädyül, adyö; 3) gil; 4) kopanön; 5) luüno; 6) luspäd; 7) pläd; 8) filäb; 9) lielön; 10) flukatim; 11) fatel (patra-flanka), motel (patrina-flanka); 12) cuk.

### Esperanto

### germana

### Volapük

angul	Winkel	– 7)
anĝel	Engel	lanél
anim	Seele	lan
ankaŭ	auch	i
ankoraŭ	noch	nog
anstataŭ	anstatt	– 8)
antaŭ	vor	bif
apart	besonder	patik
aparten	gehören	lönön
apenaŭ	kaum	kotö
apud	bei	lä, neb
arb	Baum	bim
arĝent	Silber	siléf
atend	warten	valadön
aŭ	oder	u
aŭd	hören	lilön
aŭskult	anhören	– 9)
aŭtun	Herbst	– 10)
av	Großvater	– 11)
avar	geizig	monälik
azen	Esel	– 12)

## 5. Kaj poste...

### 5.1 La disvastiĝo de la lingvoj

Ni jam atentigis pri tio, ke Schleyer en rapida sinsekvo (ĝis la 9a eldono de 1888) daŭrigis la eldonon de sia gramatiko. Malgraŭ sia poligloteco li ne mem eldonis sian lerno-libron ali-lingve, sed limigis sin al



kvar-paĝaj mini-gramatikoj, ia-sence la Ĉefeĉ-ŝlosiloj de Volapük<sup>49</sup>. La vera pedagogo de Volapük fariĝis Auguste Kerckhoffs (1835-1903)<sup>50</sup>; kies lerno-libroj adaptiĝis en multaj lingvoj.

Zamenhof, de sia flanko, startis kvin-lingve: ruse, pole, france, germane kaj angle kaj lasis al la novaj adeptoj krei proprajn lerno-librojn kaj vortarojn. Sur la vortara kampo li longe kunagadis per propraj verkoj aŭ per kontrolado en la Kolekto Aprobata.<sup>51</sup>

La disvastiĝo de Volapük estas priskribita divers-loke.<sup>52</sup> Kiam aperis Esperanto en somero 1887, jam okazis la Volapük-kongresoj de Friedrichshafen<sup>53</sup> en 1884 kaj de Munkeno<sup>54</sup> en 1887 kaj la lingvo iris al sia apogeo kiun baldaŭ sekvis disfalo kaj pereco.

Esperanto, de sia flanko, longe restis en la ombro de la nekonateco. Sed ĉi trankvila ekzistado kontribuis al la stabiliĝo kaj elformiĝo de la lingvo. Ĝi povis venki sian unuan krizon en 1894, kiam la plimulto rifuzis reformojn. Post 1900, ĉefe dank' al la agado de la Pariza eldonejo Hachette, la progreso iĝis pli rapida kaj eksploda. Plimultiĝis revuoj,

<sup>49</sup> Kp. HAUPENTHAL 1982 a.

<sup>50</sup> Pri Kerckhoffs kp. CARACO, HAUPENTHAL 2003 a, 2003 b, KAHN 1972, 1996.

<sup>51</sup> Kp. ITÔ 1998.

<sup>52</sup> Kp. i. a. KNIELE 1989, SCHMIDT 1998.

<sup>53</sup> Kp. HAUPENTHAL 1984.

<sup>54</sup> Kp. *Bericht..., Der II. internationale...*, HAUPENTHAL 1987, Nunod, OBHLIDAL.

fondiĝis lokaj grupoj kaj landaj asocioj kaj en 1905 komenciĝis la serio de Universalaj Kongresoj.

La komenca progreso de Esperanto ŝuldiĝas ankaŭ al la fakto, ke en la Volapük-movado ĝi trovis tendaron pli facile konkereblan jam pro tio, ke ne plu necesis konvinki pri la ideo mem de arte-farita lingvo. Multaj konvinkitaj volapükistoj trovis novan revelacion en la lingvo de Zamenhof kaj ekuzis ĝin. Tiu transiro daŭris ankoraŭ komence de la 20a jarcento, kiel montras, por ekzemplo, la kazoj de Hindrik Jan Bulthuis (1865-1945) kaj Siegfried Lederer (1861-1911)<sup>55</sup>. La nova movado de Zamenhof transprenis ankaŭ strukturajn elementojn de la Volapük-movado:

1. La revuoj *La Esperantisto*<sup>56</sup> (1889-1895), *Lingvo Internacia*<sup>57</sup> (1895-1914/20) kaj *Oficiala Gazeto Esperantista* (1908/09-1921/22) ia-sence ludis la saman centran rolon kiel la *Volapükabled* (1881-1908) de Schleyer.

<sup>55</sup> Pri Lederer kp. HAUPENTHAL 2010.

<sup>56</sup> *La Esperantisto*. Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto. 1889-1895. Kun postparolo de Reinhard Haupenthal. (Repr. de la eld. Nürnberg 1889-1895.) Hildesheim, Zürich, New York: Olms 1988.

